MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 1

JANUARO 2023 Kol. 452/39

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Novjara bondeziro Festo 120 jaroj de E-klubo
Internacia tago de homaj rajtoj El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx



## Sur la sojlo de la nova jaro 2023

Karaj kaj estimataj gesamideanoj, akceptu miajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn. Mi deziras al vi nur bonajn mesaĝojn, ke vi havu tiajn geamikojn, kiuj konsilos al vi en kazo de bezono kaj en tristo per afabla mano karesos vin. Multe da sano: kio doloras, tio baldaŭ resaniĝu. Multe da amo, ĉar ĝi en la mondo sufiĉe mankas. Se ni ne havos amon, ni estos malĝojaj, kaj sen amikoj ni malfacile travivos.

Por ĉiu estis la pasinta jaro alispeca, sed por ni ĉiuj certe ne tro gaja, eble eĉ trista. Sed tia estas la vivo, oni devas vivi plu, esperi. Ni devas esperi, ke baldaŭ finiĝos la konflikto en Ukrainio, ĉar pro tio ankaŭ estas grandaj ekonomiaj problemoj.

Tamen mi ĝojis, ke mi povis renkontiĝi ne nur kun malnovaj geamikoj okaze de nia konferenco AEH kaj kongreso de ĈEA

en nia urbo Pardubice, sed mi povis ankaŭ konatiĝi kun kelkaj novaj.
Do permesu al mi, ke mi nome de la AEH-komitato kaj mianome deziru al vi ĉiuj multe da sano, feliĉo, kontento, sukceso kaj pluan elanon en la nova jaro 2023.

Petr Angelov, prezidanto de AEH

## Festo de la praga Esperantista klubo

Komence de novembro 2022 oni celebris la 120-an jariĝon de la praga Esperanto-klubo. Kaj estis, kion admiri! Estas admirinde, ke jam nemultajn jarojn post la ekvivo de nia Esperanto aperis en nia lando, la tiama Aŭstra-Hungara monarkio, E-lernolibro por ĉeĥoj, fare de F. V. Lorenz, kaj post nur malmultaj jaroj ekestis ankaŭ E-kluboj – la unua en Brno (1901), la dua en Prago (1902).
La komenco de la praga klubo estis modesta. Aŭtune, la 9-an de novembro 1902, pragaj esperantistoj invitis ĉirkaŭ 50 geamikojn, venis 15 da ili, kaj tiuj sukcesis fondi la klubon. La unua „E-klubejo“ fariĝis la kafejo Union. La klubo, spite eĉ gravajn malfacilaĵojn (i.a. du mondmilitojn), eltenis subpremon de naziismo kaj komunismo, tamen ĝisvivis la nuntempon.
Kaj kiel aspektis la omaĝ-festo de la 120-a jariĝo: la nuna prezidanto de la klubo kaj „la diktatorino“ de E-mental kunlabore kun ceteraj klubanoj zorgeme kaj perfekte preparis riĉan kaj interesan programon.
La vendredan vesperon, la 10-an de novembro, kunvenis ankoraŭ neoficiale kelkaj esperantistoj en la bela klubejo de pliaĝuloj Elpida. Partoprenis homoj, kiuj kutime partoprenadas tiujn aranĝojn. Do ĉeestis konatoj, geamikoj.
Komence, kiel kutimas ĉe anoj de E-mental, okazis la riĉa festeno. La bongustaĵojn preparis aninoj de E-mental.

Poste sekvis saluto kaj tosto de la prezidanto de la klubo kaj pli poste prezento de libroj de la eldonejo KAVA-PECH. Koncerne tion, ke nia eldonisto Petro Chrdle fermas la eldonejon kaj transdonas ĝin al malproksima kanada kolego eldonisto, taŭgus, ke niaj samideanoj aĉetu kiel eble plej multe da libroj, estantaj ankoraŭ ĝis nun en nia lando. La oferto estas bunta.
Dum la vespero oni povis amike interbabili kaj fine kanti kun Pavla Dvořáková.




Sabate antaŭtagmeze la gesamideanoj kunvenis en la praga klubejo. De tie ili piediris tra la urbocentro kaj haltis ĉe lokoj koncernantaj la E-movadon en Prago. Ili vidis la restoracion „U Štajgrů“ en Vodičkova strato, kie ekestis la klubo. Ili trairis Malnovurban placon, sur kiu perdiĝis pro homa tumulto kaj poste feliĉe troviĝis nia malgranda grupeto. Sur unu domo ankoraŭ videblas la surskribo „Jaroslav Šustr, Mlynářovy lahůdky“, inter la du nomoj – verda stelo! Jaroslav Šustr estis longjara prezidanto de la praga klubo en la jaroj post la dua mondmilito. Tiu ĉi valora mur-rememoraĵo sukcese rezistis la reĝimon de naziismo kaj komunismo en nia lando.
Ni spektis ankoraŭ multajn aliajn lokojn, ĝis venis jam tempo por tagmanĝo, do la partoprenantoj per metroo aŭ piedire atingis sian celon: la restoracion AdAstra. Tie ĉi en formo de bufedo estis preparita bongusta tagmanĝo.
Posttagmeze daŭris la programo en la sama spaco. La prezidanto de la klubo bonvenigis ĉiujn partoprenantojn, da kiuj estis ĉirkaŭ 50, kaj tralegis salutojn de signifaj homoj kaj organizoj.

Sekvis kontribuaĵoj de eksterlandaj gastoj – la pola samideano Irek Bobrzak instigis por „Aŭskultu, ĝuu kaj komprenu“ (pri muziko, E-elsendoj ktp.), la prezidanto de Aŭstra E-Asocio Alf. Heiligenbrunner referis pri medicina temo, homa imuna sistemo. Inter la du prelegoj surprizis nin festa torto kun brilanta fontaneto; eminenta ideo: malgrandaj potkuketoj, elkreis la simbolan numeron – 120. Ĉiu partoprenanto ricevis la sian.
Post vespermanĝo okazis prezentado de la filmo „Murdo en salona kupeo“ kun trafaj Esperantaj subtitoloj. Plej plaĉis al mi esprimo de la vorto „šmudla“. La E-mentalanoj, aŭtoroj de la subtitoloj, uzis la spritan vorteton „ŝlimŝulo“.
En la vespero okazis ankaŭ neatendita surprizo – je invito de Pavol Kaščák venis por momento la operkantistino Vanda Šípová, kiu kantis arion el la E-opero Sternenhoch. Granda aplaŭdo!
Fine de la vespero oni denove kantis kun Pavla kaj Jozefo, kiuj ludis ukulelojn.
Dimanĉe antaŭtagmeze, la lastan tagon de la evento, ni kunvenis ĉe la Esperanto-memorŝtono apud la Kongresa palaco. Denove estis malgrandaj manĝopecoj, bongusta spicita varma vino, kortuŝa kantado de la E-himno, komuna fotado ĉe la ŝtono. Sekvis promeno tra la altaĵo Vyšehrad, kiu finiĝis en la Nacia tombejo SLAVÍN, kie ni rememoris ĉeĥajn gravulojn – ankaŭ Esperantajn.



La festo finiĝis per tagmanĝo en la restoracio „V Podskalí“. La menuolisto estis skribita ankaŭ en Esperanto (prizorgis la E-mentalanoj) – do ni „bongustĝuis“ kaj reale kaj „mentale“. La tutan solenan eventon ni travivis en komuna ĝojo.

L. Chaloupková, M.Turková

# 120 jaroj de la Esperanto - klubo Prago

La abunda programo komenciĝis jam vendrede vespere, kiam ni renkontiĝis en la praga kvartalo Holešovice. Dum la programo prelegis Petr Chrdle pri novaĵoj de sia eldonejo kaj Vlasta alloge rakontis pri la oktobra vojaĝo de E-mental‘ al suda Italujo. Riĉa refreŝigo preparita de E-mentalanoj estis jam kutima afero. La bela vespero finiĝis per komuna kantado kun akompano de Pavla Dvořáková kaj Josef Kalčík.



Sabate matene ni kunvenis en la nuna E-klubejo kaj, gvidataj de la prezidanto samideano Tomáš Břicháček, ni promenis tra la urbocentro. Dum la promeno ni vizitis lokojn, kiuj havas rilaton al la Esperanto-movado en Prago kaj en Ĉeĥio, krom aliaj ankaŭ la juĝejon, kie estis arestita František Vladimír Lorenz. Ni vizitis ankaŭ Slavan insulon, kie okazis la 13-a Universala Kongreso (en la jaro 1921), kaj iaman sidejon de ĈEA en la strato Jilská. Kaj post pluaj haltejoj ni finis la promenon ĉe pli ol okdek jarojn malnova surmura reklamo kun granda verda stelo dank al la samideano Jaroslav Šustr, kiu estis longjara merita prezidanto de la EK – Prago.

La sabata posttagmeza programo daŭris en la kafejo AdAstra, kie priservis nin menshandikapuloj. Ĉi tie estis prezentita la historio de la klubo kaj projekciitaj filmoj de tiamaj membroj, ekzemple pri vizito en Bulgario en la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Pluajn prelegojn prezentis ankaŭ eksterlandaj gastoj. Naskiĝis eĉ okazo pri lingvo-traktado: ĝin "spicis" vigla – ŝerca diskuto, kiu ekstaris ĉe la prezento de noveldonita almanako pri Eli Urbanová. Montriĝis, ke la problemo troviĝas tute alikerne.

Je la fino de la vespero estis projekciita Cimrman-filmo „Murdo en salonkupeo" kun esperantlingvaj subtekstoj. Kaj kompreneble ne mankis naskiĝjubilea torto. Tiu nia estis komponita de 120 tortetoj (ĉeĥe „mufiny")!



La Esperantista klubo en Prago eldonis al sia datreveno ankaŭ specialan almanakon, kiu enhavas kaj historiajn, kaj novepokajn eventojn de la kluba



historio. Ankaŭ Bulteno de Esperantista klubo rememoros baldaŭ sian datrevenon. En la jaro 2023 estos sepdek jaroj, de kiam aperis la unua numero de la bulteno. En la lasta numero troviĝas ankaŭ kelkaj dezirleteroj al la 120-jariĝo de la klubo. La bondezirantoj estas verkistoj kaj funkciuloj, kaj sian salutleteron sendis al ni ankaŭ Miloš Zeman, la ŝtatprezidanto de la Ĉeĥa respubliko.

Jiří Tomeček

## Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro 2022

Venontan jaron, la 10-an de decembro 2023, la mondo rememoros la 75-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Estas antaŭvidata tutjara kampanjo de Unuiĝintaj Nacioj inter nun kaj tiam, sub la ŝildo “Digno, Libereco kaj Justeco por Ĉiuj!”

Sed jam en la jaro 2022 la Esperanto-movado festas la propran 75-jaran homrajt-koncernan jubileon: nia organizo, la Universala Esperanto-Asocio, kunveninta, unuafoje post la fino de la Dua Mondmilito, en Berno, Svislando, en 1947, deklaris, ke “la respekto al homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo”. Tiel ĝi anticipis la ekvalidiĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 1948 per pli ol unu jaro. De tiam ĝis hodiaŭ, ĝi subtenas la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko rilate homajn rajtojn ĝenerale kaj lingvajn rajtojn precipe.

La sinteno de UEA koncerne homajn rajtojn, laŭ la Rezolucio de 1947, “estas diktata de la ideaj celoj de la Esperanto-movado”. La movado por Esperanto ja rilatas al disvastigo de facile akirebla internacia lingvo por ĉies uzo, sed la idealo malantaŭ tiu movado estas eĉ pli vasta: pacigo kaj kunlaborigo de la homoj je tutmonda skalo.

En la Deklaracio de 1947, Universala Esperanto-Asocio proklamis, ke ĝi “rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur nepolitika bazo klopodas efektivigi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio”. Mallonge dirite: UEA laboras kun

ĉiuj organizoj kiuj celas antaŭenigi la supre menciitajn "dignon, liberecon kaj justecon por ĉiuj". Ni invitas ĉiujn tiajn organizojn al kunlaboro por la komuna bono.

Festante la 75-jaran jubileon de sia formala rekono de la homaj rajtoj, la Asocio alvokas ĉiujn homojn kaj organizojn de bona volo, ke ili kunlaboru por la realigo de la bazaj homaj rajtoj kaj por ilia plilarĝigo por la prospero kaj daŭripovo de nia planedo.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

El la redacio:
Ni legis en Starto: La Estraro de ĈEA pripensas organizi busvojaĝon al la UK en Torino, kiu okazos de 26.7. ĝis 5.8.2023. Interesiĝantoj skribu al la adreso: tomecek@esperanto.cz.

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21, 530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.